2/04

B U L T E N O
D E

# Abundana Frakcio

E N  S. A. T.

suplemento al LJP n°61 — N° 1 - Julio 68

Sekretario: K-do H.Cottereau 6 Chemin Vert 28 LA LOUPE Francio
Frakcia kotizo: 1 FF aŭ egalvaloro al H.Cottereau - Poŝtkonto: 3891-24 Paris

## D A N K O N  A L  L.J.P.- A D M I N I S T R E J O

Areto da gekamaradoj, ni provas laboron ne facilan: malfermi la okulojn de niaj samtempuloj pri ekonomiaj eventoj kaj ties konsekvencoj rilate al la vivrajtoj de ĉiuj homoj.

Jam antaŭ kelkaj jaroj ni eldonis bulteneton, kies titolo estis : "Liberigo de Mizero", sed pro diversaj malfaciloj ni estis devigataj forlasi tiun eldonadon kaj silenti.

Sed, feliĉo alvenis ! La gekamaradoj de LJP-administrejo bonkore akceptas nin inter la paĝoj de sia (ni povas diri de nia) tre interesa organo : "La Juna Penso".

Tial ni estas tre dankemaj al ili kaj provos, en tiu rubriko, aperigi temojn, kiuj estos samvaloraj kia estas la ĉiam interesoplena enhavo de LJP.

Dank'al ili ni estas tre feliĉaj verki denove pri nia celo: "Liberigo de nia klaso".

Dankeme kaj fratece, Kotro.

.--==o==--.

## F O R  L A  D I K T A T O R E C O N  D E  L A  M O N O !

La mono, sub sia nuna formo, estas koncepto, kies deveno perdiĝas en la mallumaj antikvaj tempoj. Oni konservas tiun kadukaĵon kvankam ĝi devigas nin intermalamegi, tial ke oni preferas la antaŭjuĝojn al ĉio ajn. Efektive, oni vidis homojn forĵeti kadukan aŭtomobilaĉon aŭ malnovan fornon al rubejo.... sed forĵeti tien la kadukajn ideojn... tio ne estas serioza !

(el "La Grande Relève", organo de M.F.A)

La kapitalista sistemo malbone funkcias: ĝi limigas la produktadon anstataŭ helpi ĝin.

Stranga mono, kiu malhelpas samtempe la produktadon kaj la konsumadon!

J.DUBOIN

# Vojkruco

Tro da tritiko, tro da lakto, tro da butero, tro da fruktoj, tro da ŝtofoj, tro da ĉio kaj tro da .... mizeruloj!

Stokado kaj detruo de nutraĵoj por resanigi la merkaton kaj .... milionoj da malbone nutrataj homoj !

Kaj tian plej frenezan kaoson oni kuraĝas nomi: ekonomia sistemo.. ??

Ja, estas fakto, ke por subteni la altajn prezojn de la varoj oni detruas ilin, ekz.: en Francio nun, kiam estas tro da florbrasikoj, da tomatoj, da artiŝokoj, kaj aliaj, la rikoltoj estas detruitaj kaj la produktantoj estas pagitaj de instanco oficiala, je la kosto de la impostdonantoj. Pri la tritiko, la butero, la ŝtato aĉetas la plusaĵojn kaj stokigas ilin en magazenegojn aŭ en fridujojn. En Usono, ekzistas la "tritik-banko", kiu pagas la bienulojn,por ke ili ne kulturu la kampojn.

Tutan libron oni povas verki pri tio...

Tio,ja,estas vero.

Nun la homoj per la produkto-aparato celas nur alproprigi al si monon ne pensante, ke la racia celo de la produktado estas havigi al ĉiuj homoj la vivrimedojn, pere de pagilo (kion oni povas nomi distribua mono) bazita sur la produkto-povo de la socio.

Ni staras nun ĉe kruca vojo !

Ĉu sekvi la nunan sistemon: konkurenco, kontraŭagoj, malamikeco, mizero, milito ;

Ĉu starigi racian sistemon: kunlaborado, helpemo ,amikeco almenaŭ frateco, kaj krome feliĉo !

Ne pensu, ke alia homo estas pli aĉa ol ni mem kaj ke naskiĝo de vere homa socio estas neeblaĵo !

Se tiu neeblaĵo estas la estonto, tiam ve al ni,

"Ni ĉiuj mortos pro nescio kiel vivi !"

---

## alvoko al niaj gekamaradoj

(Sekve de nia noto en Sennaciulo de oktobro 67)

Ni devas nepre grupiĝi pli firme por kunlabori, tial ni provas aperigi en LJP artikolojn, kiujn vi uzos por via propagando, kaj novaĵojn pri la vivo de nia frakcio.

Kiuj kapablas verki, tiuj sendu al ni originalajn aŭ tradukitajn artikolojn pri ekonomio. Same sciigu al ni pri viaj kunvenoj kaj klopodoj.

Memstara socio konsistas nur el memstaraj anoj; ĉiu devas serĉi sian vojon en tia socio kaj klopodi en ĝi por la bono de ĉiuj.

Memstara homo ne devas ŝafe sekvi alian aŭ atendi, ke la aliaj klopodu anstataŭ li, sed mem labori, helpi laŭ sia konscienco al efektivigo de sia idealo.

Ni devas konduti same en nia frakcio, ni esperas tion de vi, sekve ni ricevos baldaŭ viajn sugestojn, konsilojn, verkojn kaj subtenon.

Ni antaŭdankas vin,

sekretario K-do Kotro:

(H.Cottereau, 6 Chemin Vert, 28 LA LOUPE, Francio.
Poŝtkonto: H.Cottereau 3891-24 Paris)

Por kompensi la elspezojn de la bulteno, ĉiu frakciano pagas frakcian kotizon: 1 FF.

Krome, la frakciano abonas "La Juna Penso"n : 5 FF,en kiu la bulteno estas enŝovita.

Tiujn sumojn oni pagas ĉu al H.Cottereau, ĉu al la Perantoj de LJP, indikante la esencon de la pago.